# Babiladaj rondoj

... okazos je la 19-a, **vendrede** ...

**la 8-an de januaro 2016**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
av. Nestlé 9, Vevey
tél. 021 922 34 74 / 079 393 32 63

**la 22-an de januaro 2016**
ĉe Marie-Antoinette et Knud Sunier
av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56 / 079 210 97 75

**la 12-an de februaro 2016**
Fonduo ĉe Francisko - 076 411 14 55

**la 26-an de februaro 2016**

**la 11-an de marto 2016**

Ne forgesu aliĝi ĉe:
http://doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd

# Novaĵo

Je la 19-a de decembro la kutima Zamenhofa festo okazis en la loko de USL en Ouchy. Ni malkovris la filmojn de Francisko pri la Universala Kongreso en Lillo kaj pri la ekspozicio en Laŭzano. Dankon al Francisko, kiu kaptas regule per diskreta kaj atentema "okulo" la eventojn de nia societo por nia plezuro kaj por tiu de la idaro. Sinjoro Dieter Rooke venis speciale el Interlaken por partopreni tiun eventon; tre plaĉas al ni renkonti lin. Dankon al li. Poste ni fonduumis en la apuda restoracio. Tiuj renkontoj estis kiel ĉiam tre amikege kaj ĝoje. Ni estis 18 partoprenantoj.

## Laŭzana Esperanto – Societo


Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

januaro 2016 – n° 1

**Lunde, la 4-an de januaro 2016 je la 20-a**
ĉe Espace Dickens - Rue Dickens 6, Laŭzano

*Temoj : diskuto pri nia venonta biblioteko, pri babiladaj rondoj venontjaraj kaj pri diversaĵoj diskutotaj en la asembleo.*

*Pro tio, alportu la E-librojn, kiujn vi ne plu deziras konservi. Ili estos interŝanĝotaj inter partoprenantoj kaj la cetero estos donata al CDELI.*



*Eblas ke la 3 Reĝoj pasos tra Dickens tiuvespere...*



***Lunde la 1-an de februaro***
*Ĝenerala asembleo de la Laŭzana Esperanto Societo*

***Lunde la 7-an de marto***
*Decidota*

# 100-a Universala Kongreso de Esperanto

LILLO (Francio) 25an de julio – 1a de aŭgusto 2015

(1a parto)

1905 – 2015 : 110 jaroj pasis inter tiuj 2 datoj.

Kial oni memorfestis la 100-an Kongreson nur tian jaron ?

Tio meritas etan klarigon. Do, kiel vi ĉiuj scias :

Dum la lasta jarcento okazis 2 teruraj mondmilitoj, de 1914 ĝis 1918 kaj poste de 1939 ĝis 1945. Dum tiuj nigraj jaroj la revo de Zamenhof ne plu povis kunigi la homojn.

Sed tamen, el Ĝenevo, kie situis la ĝenerala sidejo de UEA, oni multe helpis amasojn da militkaptitoj, sendante pakojn kaj milojn da leteroj por retrovi malaperintajn personojn el kaj en diversaj konfliktaj landoj. Kaj la iniciatinto de nia lingvo mortis en 1917. Lia laca koro ne plu povis bati por la dezirata harmonio inter la popoloj. Estas interese rimarki, ke en 1913, 1939 kaj 1947 UK-oj okazis en Berno en nia neŭtrala lando.

En 2005 la franca esperantistaro organizis kongreson en Bulonjo ĉe Maro kun ekzakte la sama nombro de partoprenantoj kiel en 1905 (688) el 20 landoj. Mi havis ĝojon partopreni ĝin. En la granda katedralo okazis sankta meso en E-o. Britaj E-oj organizis busan ekskurson en Dovero (Douvres). Post la fama submara tunelo ni malkovris la marbordon; la famaj blankaj klifoj ne estis videblaj, ĉar la nebulo estis tiel densa, vere kiel oni aŭdis, ke okazas en Britio.

10 jarojn poste estas granda plezuro por mi resumi nian ĉeeston en Lillo inter la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015. Post plimalpli bonaj aventuroj en Parizo 6 samklubanoj el Laŭzano atingis Lillon, kiu estas la ĉefurbo de la regiono, kun sufiĉe da instalaĵoj por ricevi preskaŭ 3000 personojn el 82 landoj de la tuta mondo. Kun granda intereso ni malkovris, en la kongresa libro, la abundan programon. Tiel, multe da proponoj invitis nin en la multaj salonoj. Estis tre malfacile elekti inter : prelegoj, ekspozicioj, kursoj, kantatelieroj, koncertoj, teatraĵoj, libroservo, oratora konkurso, prezentado de novaj libroj, aŭkcio, ekskursoj, estas senfina tiu listo. En la granda kongresejo estis multe da ŝtuparoj kaj liftoj ne facile troveblaj inter la etaĝoj kaj duonetaĝoj. En tiu granda abelujo oni aŭdis senfinan zumon, trovi sian vojon estis problemo.

Sabato vespere okazas la movada foiro, en kiu la diversaj asocioj varbas pri siaj laboroj kaj montras siajn esperantaĵojn. Jam estas okazo por hazarde renkonti konatulojn kaj oni aŭdas senfine ĝojekkriojn.

Dimanĉo la 26-a je la 10-a okazis la solena inaŭguro kun multe da paroladoj faritaj de la komitato, la estraro, la aŭtoritatoj. Ĉiam estas tre kortuŝa momento, kiam la reprezentantoj nome de la diversaj landoj salutas la publikon. Tre kortuŝa momento estis, kiam oni anoncis la ĉeeston de la nepo de L.L. Zamenhof. Li naskiĝis en 1925 kaj estas la sola nepo de Zamenhof. Li nomiĝas Ludoviko-Kristoforo Zalewski-Zamenhof. Li venis sur scenejon kun unu el siaj filinoj. Jen kelkaj vortoj el lia parolado :

«En la nomo de la familio Zamenhof mi salutas la Kongreson. Tiujn samajn vortojn mi, tiam naŭjara knabeto, adresis en la jaro 1934 al la 26-a UK en Stokholmo. Hodiaŭ, naŭdekjarulo, mi ilin ripetas, salutante la Centan, la Jubilean, ĉi tie en Lillo. Nia lingvo, miaj ideoj estas nature ligitaj al la paco, ni ja estas pacaj batalantoj, kiuj promesas sanktan harmonion al la mond'eterne militanta.» Kredante ke E-o estas giganta paŝo por la homaro, li sentas kvazaŭ sanktan devon daŭrigi la laboron de sia avo.

Li transdonis la taskon kaj honoron reprezenti la Zamenhofan familion al siaj filinoj, kiuj ambaŭ konservis la familian nomon. Margareta poste legis leteron de sia fratino Hanna, kiu vivas en Filadelfio USA. Ili povas estis fieraj kaj dankemaj esti posteuloj de tiu bonfaranto de la homaro.

Fine ni kune kantis tutkore nian himnon, en tiu momento ni vere havis la senton esti veraj mondcivitanoj. Vespere je la 8-a la Nacia Vespero mirigis nin per la prezentado de Francio, kiu gastigis nin. Per dancoj kaj muzikoj ni superflugis la landon de la sudo ĝis la nordo. Oni aŭdis multe da konataj kanzonoj ( almenaŭ por ni) bele kaj ĝuste tradukitaj al E-o. Inter ili Marie-Paule Belle, Pierre Bachelet, Georges Brassens, Jacques Brel, eĉ Zaz, juna moderna kantistino kaj multaj aliaj. Sur la scenejo estis tipa karnavala figuro de la regiono, unu grandegulo, kiu senemocie rigardis la tutan eventon.

Charlotte Blanc Maillard

(daŭrigo en la venonta informilo)